# LIGILO

N-ro 09 - OKTOBRO 1990

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

***** CAIXA POSTAL 11-1105 CEP 70084 TEL 226-1298 BRASILIA (DF) *****




## KARA LEGANTO

Kun granda ĝojo kaj plezuro, cetere eĉ iom fiere, ni prezentas al vi la 4-an eldonon de LIGILO en tiu ĉi jaro 1990.

Tiusence ni devas danki al vi ĉiuj, kiuj subtenas BEL-agadon kaj plej diversmaniere helpas teni LIGILOn vivanta.

Al vi kiu veturis aŭ flugis longajn distancojn por atingi la belan kaj gastaman Salvador kaj partopreni en la 26-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO, ni deziras ĉi-okaze plej elkore diri DANKON; al vi kiu ja estas la motivo de nia plu-ekzisto kaj okazigo de tiaj eventoj.

Tute specialajn gratulojn kaj dank-esprimojn BEL ŝuldas al tiu hom-grupo kiu konsistigis la Organizan Komitaton de la 26-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO, sub la gvidado de samideano RONILSON, prenante sur sin tiun tre pezan kaj gravan taskon organizi tiaspecan eventon. Nepre menciinda estas la altvalora apogo de SOCIETO ESPERANTISTA DE SALVADOR kaj la kunlaboro de ESPERANTA STUDGRUPO ZAMENHOF.

Samajn dankesprimojn al nia membraro kiu dum plurjara periodo fidele pagas sian kotizon al BEL, kaj krome estas ĈIAM PRETA finance kunlabori en projektoj kiel la partopreno de BEL en tiel grandioza, impona kaj rezulto-plena entrepreno kiel la 11ª INTERNACIA BIENALO DE LA LIBRO ĵus okazinta en São Paulo, kies detalan raporton vi povas legi aliloke en tiu ĉi bulteno.

Ankaŭ dankon al la geamikoj kiuj al ni skribis prezentantaj siajn rimarkojn, korektojn, atentigojn, kritikojn, kiuj povas esti tre valoraj kaj utilaj por nia laboro.

# O QUE A EDITORA GLOBO, A BRASILIENSE, A RECORD, A NOVA FRONTEIRA E MUITAS OUTRAS EDITORAS ESTÃO FAZENDO PELO ESPERANTO NÃO ESTÁ ESCRITO.

Todo mundo compra livros, e isso é muito bom. Mas melhor é saber que, ao comprar os livros das principais editoras do país, você está contribuindo para a edição de mais obras em Esperanto. Isto em função do FUNDO EDITORIAL PRÓ-ESPERANTO! Você encomenda pelo reembolso postal o livro que quiser e automaticamente dá uma força para que a ZAMENHOF EDITORES publique os livros de que o movimento esperantista precisa. E sem pagar a mais por isso! Escreva pra gente e receba, sem compromisso, maiores informações sobre como participar. Com certeza você vai defender essa idéia a fundo.

**FUNDO EDITORIAL PRÓ-ESPERANTO**

Zamenhof Editores

Caixa Postal 1531
74.001 - Goiânia - Go
Tel.: (062) 223-6064
Fax (062) 225-3698



## "MENSO-ŜTORMO" EN NORDORIENTO-BRAZILO

Kun granda intereso BEL ricevis el la Prezidanto de Associação Potiguar de Esperanto, D-ro JOSE MARIO MARQUES, tre gravan dokumenton, kiu rilatas al Raporto Pri la I Laborkunsido de la Reprezentantoj de Esperanto-Asocioj en Nordoriento de Brazilo. La kunsidoj, metodike kaj science kondukitaj laŭ la tekniko de "mensoŝtormo", celis interalie profundan studon kaj identigon de la problemoj kiuj baras la integriĝon kaj internan koheron de la regionaj Esp-organizoj.

Sekve al listigo de la problemoj rilataj al ĉiu temo, la diversaj laborgrupoj laŭprioritate elektis la solvendajn problemojn; provis eltrovi elirvojojn kaj indiki na bezonatajn rimedojn.

La temaro inkluzivis:

I --- Ĝenerala Organizado kaj Administrado de la Esperanto-Movado en la Regiona (NO) kaj Lokaj Kadroj.

II -- Disvastigo de Esperanto - Informado.

III - Esperanto-Instruado/Edukado

IV -- Utiligado de Esperanto.

Partoprenintoj:

1 - Karlo Kardozo, FORTALEZA/CE, Curso de Esperanto de UFCE

2 - José Mário Marques, Auricélia Valentim de Oliveira, Ivaldo Alves de Souza, Jailton Tavares de Melo, José Meira Mendonça, Marcelo Pereira da Silva, Marcos Campos da Silva kaj Ranilson Albino Barros, NATAL/RN, Associação Potiguar de Esperanto

3 - **Ramatis**, J.PESSOA/PB, Loka Grupo
4 - **Livio Oliveira**, CAMPINA GRANDE/PB, Loka Grupo
5 - **J.M. Mabesoone**, RECIFE/PE, Pernambuka Esperanto-Asocio
6 - **Aristophio Alves Filho**, MACEIÓ/AL, Loka Grupo
7 - **Luiz Mário Santos da Silva**, ARACAJU/SE, Delegito de UEA
8 - **Aldacy de Souza Xavier**, SALVADOR/BA, Zamenhof Studgrupo kaj Sociedade Esperantista de Salvador.

Al eventualaj interesatoj BEL disponigas kopion de la Raporto kontraŭ 1 IRK (internacia respond-kupono) aŭ 1 poŝtmarko por simpla letero al eksterlando. La peto celas kovri la elspezojn kun la poŝto kaj fotokopiado.

GRATULOJN AL LA ORGANIZINTOJ !



POR KOLEKTIVA LABORO

"Manko de sistema laborplano, amatora improvizado, nesufiĉa posedo de Esperanto de la flanko de la kompilintoj, foresto de hispanamerikaj terminoj kaj de abunda frazeologio karakterizas, inter aliaj negativaj faktoroj, la enhavon de la nunaj hispanaj-Esperantaj vortaroj.

Alvenis jam la tempo korekti ĉi lamentindan staton de la aferoj por redoni en Esperanton, kiel eble plej fidele kaj plastike, la riĉon de la kastilia lingvo ne nur kiel ĝi uziĝas en Hispanio sed ankaŭ en la hispanligva Ameriko."

Tiel sin turnas Venezuela Esperanto-Asocio al la frataj Asocioj de ceteraj hispanlingvaj landoj amerikaj kaj al Asocio hispana, kun invito al samideanoj kompetentaj pri leksikografio kaj pretaj kunlabori en la ellaborado de altnivela vortaro hispanlingva-Esperanta.

BAHIA 26A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

## EHOJ DE SALVADOR

I) De la 6-a ĝis la 10-a de julio pasinta, okazis en la bela kaj gastama Salvador (BA), la 26a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO, kiu altiris preskaŭ 300 brazilanojn el 18 malsamaj Statoj. Rimarkinde estis la relative alta nombro da gejunuloj partoprenantaj.

II) En la kadro de la kongreso, okazis por la tria fojo la Esp-ekzameno laŭ la 3 diversaj gradoj, nome: elementa, meza kaj supera. Kandidatiĝis 30 personoj el kiuj 24 plene sukcesis. La ekzamenintojn konsistigis la jenaj eminentaj esperantistoj: Euclides Carneiro da Silva, Geraldo Mattos, Leopoldo Knoedt, Walter Francini kaj Elvira Fontes.

III) Okaze de la kunveno de delegita reto sub la gvidado de la UEA Ĉef-Delegito en Brazilo, samideano JORGE DAS NEVES, speciala trofeo estis meritite aljuĝita al unu el la plej aktivaj brazilaj esperantistoj, kiu estas Majoro SILVA VELHO.



## NI GRATULAS AL VI...



Kun plezuro kaj fiero samideano RAMATIS Santos Pessoa de Luna, el João Pessoa PB., anoncas la naskiĝon, la 12-an de aprilo 1990, de sia filo LUIZ ZAMENHOF Costa Pessoa de Luna. La patrino, Maria José Ribeiro Costa Luna, estas evidente tre feliĉa. Al la gepatroj plej korajn salutojn kaj gratulojn. Kaj al la ĵusnaskito ni kantu:  VIVU LONGE SUR TERO KUN LA SORTO PLEJ RIĈA !

BIENAL

## BRASÍLIA

" Ninguém sabe falar
Esperanto
Miséria, miséria em
qualquer canto"
Titãs

**MISÉRIA CULTURAL NÃO É UM MAL NECESSÁRIO. VOCÊ PODE FALAR ESPERANTO.**

**Informe-se no estande 131 da 11ª Bienal Internacional do Livro**

**LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**

**CP 11.1105 — CEP 70084**

**BRASÍLIA — DF**

# ESPERANTO EN LA 11ª INTERNACIA BIENALO DE LA LIBRO

## FINA RAPORTO

**Kiuj Subtenis?**

**La projekto akceptis 160 financajn kontribuojn, rezulte de 153 individuaj membroj kaj 7 brazilaj Esp-organizoj. Tiuj donacoj okazis de oktobro/89 ĝis aŭgusto/90 kaj atingis la sumon de** 8.463.67 BTN's.

**Laŭ informo de Josias Ferreira Barboza, Vic-Prezidanto de BEL, pere de kontakto kun Estrarano en Havano, okaze da la 75ª Universala Kongreso de Esperanto, Universala Esperanto-Asocio kontribuos al la projekto per donaco de libroj valoraj je 1.000,00 nederlandaj guldenoj.**

**Ĝeneralaj Informoj:**

**Antaŭ ol paroli pri la graveco de la partopreno de Esperanto en tiel grandioza evento, estus konvene elmontri kelkajn ciferojn tiurilate:**

| | | |
|---|---|---|
| Vizitantoj | : | 1.058.000 |
| Standoj | : | 206 |
| Gelernantoj vizitantaj | : | 250.000 |
| Landoj partoprenantaj | : | 23 |
| Ekspoziciantoj | : | 902 |
| Paralelaj eventoj | : | 830 |
| Lernejaj grupoj | : | 1.100 |
| Verkistoj ĉeestantaj | : | 887 |
| Vendoj (ekzempleroj) | : | 6.960.000 |
| Verkoj ekspoziciitaj | : | 122.000 |

**BEL-Ciferoj**

**Kvankam la nombroj kiuj spegulas la BEL-Partoprenon povas aspekti tro modestaj kaj palaj kompare al la ĉi-supre menciitaj, ili estas tre pozitivaj laŭ plej diversaj vidpunktoj:**

| | | |
|---|---|---|
| Vendoj (libroj) | : | 692 |
| Vendoj (guldenoj) | : | 9.399 |
| Verkoj ekspoziciitaj | : | 303 |
| Aliĝoj al BEL | : | 17 |
| Aliĝoj al UEA | : | 10 |

| | | |
|---|---|---|
| Abono de gazetoj | : | 7 |
| Informfolio(distribuo) | : | 19.000 |
| Paĝ-markilo | : | 1.000 |

La relative malgranda nombro da titoloj elmontritaj devenas de la limigita spaco de la stando (nur 15 m²), en komparo al ĉirkaŭ 1.000 malsamaj titoloj disponeblaj ĉe la Libroservo de Brazila Esperanto-Ligo.

<u>Ni Dankas Al Vi Kiu</u>...

finance subtenis la projekton;
per via optimismo infektis kaj kuraĝigis nin;
vizitis nian standon;
volontule deĵoris dum tiu periodo;
helpis varbi por Esperanto;
iel maniere kontribuis por la efektivigo.

Menciindas la fakto ke, krom la 3 plentempaj deĵorantoj senditaj de BEL, Nèia Lùcia Souza, Francisco Mattos kaj Carlos Maria, pluraj urboj estis reprezentitaj per la partopreno de kunlaborantoj kaj deĵorantoj, nome: Porto Alegre, São Paulo, Rio de Janeiro, Paraíba do Sul, Taubaté, Campinas, Ferraz de Vasconcelos, Salto, São José do Rio Preto kaj São Miguel Paulista.

Bonintence ni ne mencias la nomojn kaj tiel provas eviti forgeson de kiu ajn kunhelpanto.

Nuran escepton ni faras al persono de S-ino May Bijleveld, el Rio de Janeiro, kiu malgraŭ sia aĝo, estis plena je entuziasmo kaj ĉiam fervore argumentis por Esperanto. S-ino May estis, sendube, bela ekzemplo de eltenemo kaj sindonemo. Ŝi karakterizis la Esperanton vivantan.

<u>KURIOZAĴOJ</u>

-Vizitis la standon usonano kiu loĝas en Campinas (SP) kaj ankoraŭ en sia lando estis lernanto de LIDIA ZAMENHOF!

-Konatiĝis al ni germano kiu loĝas en Brazilo kaj eklernis la lingvon en la unua Esperanto-Klubo de la mondo, en Nuremberg (Germanujo).

# Você já pode falar com o mundo inteiro, sem falar todas as línguas do mundo.



Maiores informações sobre o Esperanto na:

## XI BIENAL INTERNACIONAL DO LIVRO

Estande 131



## K O N K L U D O J

Estas absolute klare, ke la partopreno de ESPERANTO en la 11ª INTERNACIA LIBRO-FOIRO, pere de BRAZILA ESPERANTO-LIGO, alportos tre pozitivajn rezultojn en soci-kultura kampo de nia movado. La ŝanco reklami Esperanton en la sino de tiel speciala kaj kulturavida publiko; kaj la profesiaj kontaktoj kun eldonistoj kaj verkistoj estas faktoroj apenaŭ takseblaj ĉi momente, kiuj povos baldaŭ disflori.

### NINGUEM SABE FALAR ESPERANTO,
### MISERIA, MISERIA EM QUALQUER CANTO
(Titãs)

O Titã Arnaldo Antunes esteve na BIENAL autografando seu livro "Tudos" e aproveitamos para fazer contato. Após a noite de autógrafos, Arnaldo visitou o Estande 131 da LIGA, onde autografou um exemplar de seu livro para a BEL, e mostramos a revista "LEIA" de agosto, onde publicamos um anúncio sobre o Esperanto na Bienal, usando a frase da música "Miséria" como argumento. Falamos sobre a música no mundo esperantista e o presenteamos com algumas fitas em Esperanto, incluindo "Ora Team'" e "Aerlumo".

### O MENINO MALUQUINHO
### E O MENINO QUADRADINHO

Assim como "Flicts", todos de autoria de Ziraldo, foram autografados pelo mesmo para a BEL. Na oportunidade falamos sobre o Esperanto, o público esperantista e possibilidades de edição de suas obras na Lingua Internacional.

## ĈU NOVA MECENATO?

Reage al la artikolo "La Unua Reago" (A Primeira Reação) publikigita en la lasta Ligilo N-ro 08, ni petas permeson publikigi tie ĉi leteron ricevita de samideano Josè ROMÃO Filho, kiu tekstas jene:

"Brasilia, 02 de julho de 1990.

Ref: LIGILO nº 08, Julio 1990.

Ao tomarmos conhecimento da reportagem versando sobre o nosso empreendimento, constante do acima epigrafado, vimos oficialmente através da presente apresentar a nossa felicidade e o nosso agradecimento pela matéria publicada.

Outrossim esclarecemos que, como forma de reconhecimento, colocamos a disposição desta Liga, como doação o Lote nº 03 do Setor "C", Quadra 03 , Chácara 09 na Avenida Brasil, vizinho ao Lote nº 01, que já pertence a esta Liga, ficando portanto V.Sas., a partir da presente com uma área total de 400m².

Colocando-nos à disposição para a devida outorga da escritura, quando da disponibilidade de V.Sas., penhoradamente, agradecemos.

Atenciosamente,

Josè ROMÃO Filho
C 09, Lote 8, Loja 2
Tel:(061) 3351-4393
Taguatinga, BRASILIA, DF."

Aldone, Samideano ROMÃO, proponis subvencii la duon-koston de la nuna eldono de LIGILO !!! MIRINDE,. Ĉu ne ? Certe vi memoras ke ĉiuj kostoj de LIGILO N-ro 08 estas same pagitaj de li.

Ĉu ni rajtas aserti ke Esperantujo jus konkeris sian plej novan mecenaton? Certe oni ne troigas.

ANKORAŬFOJE elkoregan DANKON al samideano José ROMÃO Filho, kun la plej sinceraj bondeziroj de plena sukceso en lia entrepreno.



## BRAZILA ESPERANTISTO HAVAS NOVAN REDAKTORON

Kun granda ĝojo kaj feliĉo ni havas la honoron distrumpeti la BONAN NOVAĴON, ke amiko JORGE DAS NEVES, nia Ĉef-Delegito de UEA, akceptis fariĝi la Redaktoro de "Brazila Esperantisto".

La konfirmo alvenis perletere, post kontakto en Salvador okaze de la programero "BEL-Raporto" gvidita de Enivaldo Alves Silva, kiel 1ª Sekretario de BEL, reprezentante la Prezi- danton Deputito JOSE LINS ALBUQUERQUE.

Kiel informite en aliaj numeroj de tiu ĉi bulteno, ekde la pasinta jaro, Brazila Esperantisto ne plu povas kalkuli je la kunlaboro de tre valora kaj kompetenta helpanto, kiu estas amiko ITACIR LUCHTEMBERG. Pro privataj kialoj, ITACIR devis rezigni pri la redaktado de Brazila Esperantisto, kio estis granda perdo por BEL. Bonŝance kaj finfine ni sukcesis, post longdaŭra esplorado, novan redaktoron kies kompetentecon ĉiuj ni konas.

Al la amiko JORGE DAS NEVES plej elkoran dankesprimojn kaj la bondezirojn de plena sukceso en via nova tasko! Verkistoj, poetoj, skribemuloj kaj kritikemuloj bonvolu ne perdi la okazon elmontri vian talenton. Tuj kontaktu la Redaktoron por prezenti viajn ideojn.

Laŭ nia laborplano, estas intenco de BEL-Estraro eldoni komence de la venonta jaro plian numeron de nia oficiala organo "Brazila Esperantisto", depende de la financa kapablo de BEL. Eble ĝis tiam sin anoncos alia "voluntulo" preta finance subteni la projekton, kiel okazis lastfoje. Via kunlaboro estos tre BONVENA!

## ILHEUS TEM NOVA DIRETORIA

Através de eleição realizada em junho último, foi eleita nova Diretoria do GRUPO ESPERANTISTA DE ILHEUS para o biênio 90/91, que ficou assim constituída:

- Presidente : Elêus Leonardo de Sá;
- Vice-Presidente : José Maximino da Paixão;
- 1º Secretário : João Carlos dos Santos;
- 2º Secretário : Jonildo de Souza Glória;
- Tesoureiro : Benedito Reis Dias;
- Bibliotecária : Patrícia Gomes Helney;
- Propaganda e Revista: Rosani de Oliveira.

A Diretoria da Liga Brasileira de Esperanto apresenta à Diretoria recém-eleita congratulações e sinceros votos de uma profícua administração. S U C E S S O !

## CAMARA MUNICIPAL DO RIO TEM PROJETO DE LEI SOBRE O ESPERANTO

Sob o número 1047/90, está em exame pela Câmara Municipal do Rio de Janeiro, Projeto de Lei de autoria da Vereadora BAMBINA BUCCI que dá o nome de Largo dos Esperantistas ao atual Largo do Quarenta, em Guaratiba, no Município do Rio de Janeiro.

A notícia nos foi dada pelo samideano JESSE JOSIAS DE PAIVA através de cópia do Projeto publicada no DCM - Diário da Câmara Municipal do Rio de Janeiro, edição de 21 de setembro de 1990, que reproduzimos a seguir. A Presidência da LIGA já oficializou àquela Casa Legislativa, e em particular à Vereadora BAMBINA BUCCI, o seu apoio e congratulações pela iniciativa. Você também pode fazê-lo.

# BOLETIM DE ADESÃO 1991

**Nome** ____________________

**Endereço** ____________________

**CEP** __________ **Cidade** __________ **Estado** __________

**Telefone (   )** __________ **Data de nascimento:** ______ **de** ______ **de 19**____

**Profissão ( ou especialidade )** __________ Data de adesão: / /

**Assinatura:** ____________________

**1. LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**

**ADESÃO**

| | BTN | NCz$ |
|---|---|---|
| **Sócio Contribuinte** | 24,00 | ____ |
| **Familiar de Sócio** | 12,00 | ____ |
| **Estudante (até 25 anos)** | 12,00 | ____ |
| **Sócio Colaborador** ... a partir de | 40,00 | ____ |
| **Sócio Vitalício (30 vezes a cota do Sócio Contribuinte)** | 720,00 | ____ |
| **Donativo** | - | ____ |

**2. ASSOCIAÇÃO MUNDIAL DE ESPERANTO (UEA)**

**ADESÃO**

| | | |
|---|---|---|
| **MG - Membro Individual, recebendo apenas o MANUAL sobre o movimento esperantista** | 6,00 | ____ |
| **MJ - Membro Individual, recebendo o ANUÁRIO (e a revista KONTAKTO se menor de 30 anos)** | 14,50 | ____ |
| **MA - Membro Individual, recebendo o ANUÁRIO e a revista ESPERANTO (e a revista KONTAKTO, se menor de 30 anos)** | 36,00 | ____ |
| **DM - Membro Vitalício, com os mesmos direitos de MA (e a revista KONTAKTO, se menor de 30 anos)** | 864,00 | ____ |
| **SZ - Sociedade Zamenhof: Mecenato (não inclui adesão à UEA)** | 69,00 | ____ |

**SÓ ASSINATURA DE REVISTA**

| | | |
|---|---|---|
| **Revista ESPERANTO** | 23,60 | ____ |
| **Revista KONTAKTO** | 12,30 | ____ |
| **SUBTOTAL** | | ____ |
| **DESPESAS DE REMESSA PARA O EXTERIOR** ( Associado da LIGA, quite 1989, está ISENTO ) | + 20% | ____ |
| **TOTAL** | | ____ |

**ATENÇÃO:** - Os valores estão fixados em BTN (Bônus do Tesouro Nacional).

**NOTA:** Os valores da UEA são, a princípio, válidos até 31 de dezembro, tendo em vista a conjuntura econômica e a flutuação do câmbio.

# VITÓRIA




•Fundada por imigrantes alemães e italianos, Domingos Martins situa-se na região serrana, bem perto de Vitória. Destaca-se por suas festas populares e por suas belezas naturais, como a Cascata do Galo.

Vitoria é realmente uma ilha cercada de delícias que, apesar de mais de quatro séculos de fundação, mantém muitas de suas belezas originais. Seu litoral recortado, de águas tranquilas, verdadeiro paraíso tanto para banho como para esportes náuticos, contrasta com as construções coloniais dos antigos fortes e igrejas, guardando a tradição de sua história no centro da cidade.




## VENONTJARE,... AL VITORIA

Estas konfirmite! La 27ª BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO okazos, de la 14ª ĝis la 19ª de julio 1991, en Vitória, Ŝtato/Provinco Espírito Santo (ES)

Vitória situas en insulo de la Atlantika Oceano, ligita al la kontinento per 3 pontoj, havas pli malpli 1.500.000 enloĝantojn. La klimato estas tropika (sed ne TRO PIKA, laŭ Prezidanto de LKK / 27ªBKE).

La urbo estas sufiĉe komforta por vizitantoj ĉar kutime ne estas problemoj pri hoteloj, transporto kaj. Ĝi havas belajn pejzaĝojn, kaj tre proksime de ĝi estas kaj montaraj kaj marbordaj regionoj vere vidindaj kaj ĝuindaj.

La Kongresejo estos ESCOLA TECNICA FEDERAL DE VITÓRIA, kiu estas tre taŭga loko kun 18 ĉambroj je nia dispono kaj bona aŭditorio. Ĝi situas em parto de la urbo tre bone provizita per aŭtobusoj, taksioj, restoracioj , kafeterioj, ktp. tre proksima de la urbocentro.

27ª BRAZILA KONGRESO
DE ESPERANTO



<u>Ĝeneralaj Informoj</u>

Urbo: VITÓRIA, ES. Dato: 14--->19/07/91.

Invitis: KAPIŜABA ESPERANTO-KLUBO
Rua Gal. Osório, 127/1311 - Centro
Tel:(027)223-0082, CEP. 29202

<u>LOKA KONGRESA KOMITATO</u>:

Prezidanto: Carlos de Faria..........Tel:227-7109
Kasisto : Gilson Vilas Boas Passos..Tel:225-6532
Sekretario: João Batista Aniceto..... Tel:228-4626

KOTIZTABELO

Kategorio

1. Ano de BEL/BEJO (kvita por 1991)...30 BTN
2. Ne-ano aŭ nekvita por 1991..........60 BTN
3. Familiano de Kateg 1................20 BTN
4. Familiano de Kateg 2................30 BTN
5. Loĝante (definitive)em Esp.Santo...10 BTN
6. Infano ĝis 12-jara/eksterlandano...Senpage ne loĝanta en Brazilo

A T E N T U !

1. Pokalo ZAMENHOF - Donota al la loka grupo kun plej granda nombro da kongresanoj (nevalida por ES).
2. Pokalo NELSON PEREIRA DE SOUZA - Donota al la loka grupo kiu plej kreskigis la membraron de BEL en 1991.
3. En 1992 la gajnintoj sendu aŭ kunportu tiujn pokalojn al 28ᵃ BKE por nova konkurso!
4. Medaloj/Trofeo BEL(BR-Esp-Literaturo). Detaloj sekvos baldaŭ.
5. LKK bonvenigas sugestojn kaj proponojn por la definitiva programo de la kongreso kaj pri kiuj meritas la medalojn, ĝis la 30a de marto 1991.
6. Persono aŭ institucio starigonta standon, bonvolu turni sin al LKK por koncernaj aranĝoj ĝis la fino de aprilo 1991.
7. LKK bonvenigas donacaĵojn por Aŭkcio aŭ Lotumo. Oni sugestas regionajn metiartaĵojn kc.kc.kc.



No litoral norte, a 24 quilômetros de Vitória, a Praia de Manguinhos é muito procurada pela suas águas claras e tranquilas, além dos barzinhos famosos pelos peixes e frutos do mar.

# 27ª Brazila Kongreso de Esperanto

ALIĜILO

Nomo..............................................................

Adreso..............................................................

Naskiĝdato..............................................................

Loĝprefero..............................................................

Transportrimedo..............................................................

Intencas partopreni ekskursojn..............

Pagĉeko.............................. banko..............................

Cr$.............................. membrokateg..............

______________________________

urbo dato

______________________________

subskribo



## LISTA DE REVISTAS QUE PODEM SER ASSINADAS JUNTO À LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

PREÇOS EM BTN'

1 - BULGARA ESPERANTISTO - Órgão da Bulgara Esperanto-Asocio.................. 30,30
2 - DIA REGNO - Assinatura por 1 ano.................................. 23,60
- Assinatura por 2 anos.................................. 47,20
- Assinatura por 3 anos.................................. 70,81
3 - EKUMENISMO - Trimestral. Órgão da Liga Internacional de Esperantistas Evangelicos (KELI).................................. 17,80
4 - EL POPOLA ĈINIO - Mensal - Assinatura por 1 ano.................................. 13,40
- Assinatura por 2 anos.................................. 21,40
- Assinatura por 3 anos.................................. 30,30
5 - ESPERANTO - Mensal - Órgão da Universala Esperanto-Asocio.................. 23,60
6 - LA ESPERO EL KOREIO - Bimestral.................................. 14,30
7 - LA GAZETO - Editada 6 vezes no ano.................................. 42,80
8 - HEROLDO DE ESPERANTO - Saem 15 números no ano.................................. 16,10
9 - ILTIS-FORUMO - Assinatura por 1 ano.................................. 21,27
- Assinatura por 2 anos.................................. 42,54
- Assinatura por 3 anos.................................. 63,81
10 - INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO - Órgão da Liga Internacional de Professores Esperantistas - Trimestral.................................. 14,55
11 - INTERNACIISTO - Órgão de "Kolektivo Esperantista Komunisto"..................................
12 - JUNA AMIKO - Assinatura única - Por 1 ano.................................. 7,93
- Por 2 anos.................................. 15,10
- Por 3 anos.................................. 20,80
- Assinatura conjunto - De 3 a 7 assinaturas - Preço de cada.... 7,10
- De 8 a 29 " - Preço de cada.... 6,60
- A partir de 30 assin.- Preço de cada.... 5,66
13 - LA KANCERKLINIKO - Remessa aérea - Assinatura por 1 ano.................................. 32,06
- Assinatura por 2 anos.................................. 56,10
- Assinatura por 3 anos.................................. 81,03
- Remessa por mar - Assinatura por 1 ano.................................. 25,82
- Assinatura por 2 anos.................................. 49,87
- Assinatura por 3 anos.................................. 74,80
14 - KONTAKTO - Editada pela Organização Mundial de Jovens Esperantistas........ 12,30
15 - LAŬTE - Bimestral - Remessa por via aérea.................................. 25,10
- Remessa por via marítima.................................. 12,60
16 - LITERATURA FOIRO.................................. 45,60
17 - MEDICINA INTERNACIA REVUO - Inclui adesão à UMEA - Categoria IM-A (Recebe também a revista "Medicina Kuriero").................................. 28,40
18 - MEDICINA KURIERO - Inclui adesão à UMEA - Categoria IM-B.................................. 14,16
19 - MONATO - Mensal - Remessa por via aérea - Assinatura por 1 ano.................................. 50,90
- Assinatura por 2 anos.................................. 96,70
- Assinatura por 3 anos.................................. 137,43
- Remessa por via marítima - Assinatura por 1 ano.......... 40,72
- Assinatura por 2 anos........ 77,37
- Assinatura por 3 anos........ 109,94
20 - LA JARO - Calendário da revista MONATO - Remessa Via marítima.................. 7,36
- Remessa Via aérea.................................. 9,36
21 - OOMOTO - Semestral.................................. 14,89
22 - SIMPOZIO - Semestral - Órgão da Associação Mundial Filosófica.................. 5,40
23 - TUTMONDAJ SCIENCAJ KAJ TEKNIKOJ - Via aérea - Assinatura por 1 ano........ 28,50
- Assinatura por 2 anos....... 53,42
- Assinatura por 3 anos....... 81,92
- Via marítima - Assinatura por 1 ano..... 14,25
- Assinatura por 2 anos.... 24,93
- Assinatura por 3 anos.... 39,18

**NOTA:** Tendo em vista a conjuntura ecônomica e a flutuação do câmbio, a taxa de despesas bancárias para remessa ao exterior passa a ser 20% para NÃO SÓCIO da LIGA.

## PARANA INFORMILO REAPERAS

Kun granda ĝojo ni konstatas la reaperigon de Paranâ INFORMILO pro iniciato de la nova Estraro enoficigita de PARANA ESPERANTO-ASOCIO, nome:

- Prezidantino : Glôria Lûcia Perine
- Vic-prezidantino: Carmen Luiza Ziege
- 1ª Sekretariino : Maria Lumineide de S. Santos
- 2ª Sekretariino : Mara L.O. Rodrigues
- 1ª Kasisto : Jorge de Souza Teles
- 2ª Kasisto : Edson Tarran
- Oratoro : Prof. Geraldo Mattos
- Bibliotekisto : Fernando Kakoviecz
- Departamentoj:
  Instruado : Espedita de Castro Feitosa
  Disvastigo: Itacir Luchtemberg
  Socia : Marcia C. Oliveira Rodrigues
  Sporto : Flâvio Sampaio.

Nome de BEL-Estraro ni dankas pro la sendo de la INFORMILO, kaj plej elkore gratulas kaj salutas la novan Estraron, dezirante grandan sukceson kaj fruktodonan laboron.

## UEA-MEMBROKAMPANJO EN ITABUNA

Kun ĝojo ni konstatis la grandan sukceson de la agado de samideano HILMAR ILTON SANTANA FERREIRA, UEA-Delegito, favore al Membro-kampanjo de UEA en Itabuna, BA.

Laŭ la ciferoj de la raporto ricevita, jen la ĉefaj rezultoj:

1) El 17 homoj al kiuj estis sendita cirkulero kun invito aliĝi al UEA, 10 pozitive reagis, kio signifas 59%;
2) La nombro de UEA-membroj en Itabuna saltis de 4 ĝis 14, kio signifas KRESKON de 250% en la LOKA MEMBRARO.

Krom la eksterordinare bonaj rezultoj de la membrokampanjo, jen bela kaj imitinda ekzemplo

por ni ĉiuj. Gratulojn al samideano HILMAR pro tiu belega kaj tre valora laboro! VERE LAŬDINDA!



## EL LETEROJ RICEVITAJ

I - <u>JASON G. de Lima, J.Pessoa, PB</u>.

"La novan LIGILOn mi ricevis. Mi estas feliĉa pro la nova mecenato kiu permesis al vi eldoni la bultenon, kaj mi gratulas vin pro tio. Mi opinias ke ĝi estas tre bona kaj laŭdinda. Min ĉagrenas via decido ne plu elsendi al la membroj nepagintaj la jarkotizon.

Mi kredas prefereble ke vi sendu ilin, 2 aŭ 3 fojojn pli, eĉ al nepagintoj, instigante ilin al realiĝo. Post iom da jaroj pagante sen ion ricevi el BEL, mi kredas juste ke BEL sendu al il' la bultenojn, eĉ kun iom da perdo."

<u>NOTO DE LA REDAKCIO</u>:

Vi estas tute prava amiko JASON. Kaj la Redaktoro konsentas kun vi. Tamen, ni klarigu ke almenaŭ la lastaj 3 numeroj de LIGILO estas senditaj al pli ol 1.500 homoj! Evidente, ne ĉiuj estas membroj de BEL, BEDAŬRINDE! Sed ni garantias, ke almenaŭ la 3 venontajn numerojn de LIGILO, se la financaj kondiĉoj permesos, ankoraŭ estos senditaj al ĉiuj adresoj en nia arkivo. TRANKVILIĜU!

II - <u>George Otto VASKE, Cai, RS</u>.

"Alvenis LIGILO N-ro 8, DANKON! Ĝi plenas de legindaĵoj.

La plej bela novaĵo ja estas ke BEL ricevis terenon en la urbo KOMENDADOR ROMAO. <u>Eĉ mi povus interesiĝi pri tereno apud BEL-propaĵo</u> (Substreko nia). Domaĝe la anonco ne mencias distancon al BSB, pri akvo kaj elektro, pri akireblecoj, pri buslinio, ktp... Oni rimarkas ke ĝi situas en la Centro. Bonege! Gratulojn!..."

NOTO DE LA REDAKCIO:

Responde, ni povas anticipi ke la distanco al Brazilio estas proksimume 100km per asfaltita vojo. Estas regulaj buslinioj de Brazilio al la urbo, kaj elektro disponeblas surloke. Krome, ni informas vin ke via letero estas transdonata al samideano ROMÃO por kompleta respondo al viaj demandoj, ĉefe pri akireblecoj. Dankon pro via intereso, amiko Vaske.

FAKA AGADO EN RADIOAMATORA MEDIO

Kiel jam anoncite en pli frua numero de tiu ĉi bulteno, unu el la plej influhava kaj prestiĝa faka revuo por radioamatoroj en la tuta mondo - CQ RADIO AMATEUR - (hispanlingva eldono) publikigis en N-ro 51, marto 1988, preskaŭ kvarpaĝan artikolon kun la titolo "Esperanto kaj Radioamatoroj", subskribita de FRANCISCO J. DAVILA (EA 8 EX), el Tenerifo/Kanariaj Insuloj. Ĉi-jare kaj antaŭ nelonge, post aliaj malpli grandaj artikoloj, kaj reage al la diversaj instigaj leteroj ricevitaj, la redaktoro/eldonisto decidis aljuĝi permanentan spacon al la esperantistaj radioamatoroj, pere de UNUPAĜA rubriko sub la respondeco de FRANCISCO J. Dávila. Notindas ke la eldono de la revuo CQ RADIO AMATEUR estas monata.

Gratulon al la radioamatoroj, speciale al FRANCISCO J.DAVILA (EA 8 EX) pro tiu grava paŝo en tiun kampon.

Se vi deziras pliajn informojn tiurilate, aŭ tutsimple partopreni en la diversaj "rondoj" kiuj regule okazas en la etero, bonvolu kontakti la Landan Reprezentanton de ILERA - Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj, kiu estas Enivaldo Alves Silva (PT 2 CA), Poŝtkesto 04-0144, 70312 Brasília, DF, cetere 1ª Sekretario de BEL kaj Redaktoro de LIGILO ekde la n-ro 07.

Jen la adreso de la eldonejo:

Boixareu Editores
Gran Via de les Corts Catalanes 594,
08007 Barcelona (Espanha).

## ESPERANTO EN PLIAN LERNEJON

Inter la gesamideanoj kiuj plej vigle aktivas en la brazila Esperanto-movado, menciindas la nomo de CESAR DORNELES SOARES, el Porto Alegre, RS. Krom la fakto esti de longa tempo fidela BEL-ano, pogranda libro-aĉetanto, por kio ajn volontulo kaj ĉiam preta partopreni en niaj laboroj kaj projektoj, César estas unu el la plej entuziasmaj pri Esperanto, kaj sindone provas ĝin disvastigi kiel eble plej efike.

Danke al liaj klopodoj, ekde de la pasinta aŭgusto, Esperanto estas enkondukita en plian lernejon: "E.E. de 1º e 2º Graus Dom Diogo de Souza. La Esperanta Fako aktivas en la kadro de DLC (Dom Diogo Lingvo-Centro), kies oficiala organo ESPERANTO-GAZETO N-RO 01 ĵus aperis.

Bonŝance, la kunordiganto de la Lingvo-Centro estas li mem, César, kiu jam de 2 jaroj laboras en la menciita lernejo kiel instruisto pri la portugala kaj angla lingvoj.

Estas planite, ke la Baza Kurso okazos dum tri semestroj, po 45 horoj/lecionoj en ĉiu fazo.

Ŝe vi ŝatus ricevi informojn pli detalajn, bonvolu turni sin al amiko CESAR.

CESAR DORNELES SOARES
Mal. Frota, 278
91350 Porto Alegre, RS.

GRATULOJN AL VI CESAR! SUKCESON EN LA ENTREPRENO!

## O RIO DÁ O EXEMPLO

Muito embora com algum atraso, queremos registrar o belíssimo trabalho do samideano JOSE RABELLO DE PAULO que nos enviou já há algum tempo Relatório minucioso sobre as atividades de divulgação do Esperanto no Estado do Rio de Janeiro, junto à imprensa e televisão, no ano de 1989.

## ****** LASTE APERIS... SUR NIA BRETARO I ******

| ****** | | ****** |
|---|---|---|
| -Amkonkurantoj | gld | 3,30 |
| -Bona Sinjorino | " | 3,30 |
| -Don Kiĥoto de la Manĉo en Barcelono | " | 3,30 |
| -El Dramoj | " | 3,30 |
| -El la Biblio | " | 3,30 |
| -Elzasaj Legendoj | " | 3,30 |
| -Hungaraj Rakontoj | " | 3,30 |
| -La Instituto Milner | " | 3,30 |
| -La Intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo | " | 3,30 |
| -Komerca Korespondo | " | 3,30 |
| -Konsiloj pri Higieno | " | 3,30 |
| -La Lasta Usonano | " | 3,30 |
| -Legolibreto | " | 3,30 |
| -Nordgermanaj Rakontoj | " | 3,30 |
| -La Regado de si Mem Per Konscia Aŭtosugesto | " | 3,30 |
| -La Reĝo de la Ora Rivero aŭ la Nigraj Fratoj | " | 3,30 |
| -Rusaj Rakontoj (Fabeloj el Helenjo) | " | 3,30 |
| -Apokolokintozo de l' Dia Klaŭdio | " | 4,62 |
| -August Theodor von Grimm - Forgesita Prapatro de la Interlingvistiko | " | 13,30 |
| -Beatrice (BRAILLE) | " | 15,00 |
| -Civila Malobeemo | " | 4,95 |
| -Debato pri la "Praga Skolo" | " | 26,52 |
| -Esperanto el la Vidpunkto de Verkisto | " | 5,61 |
| -La Evangelio de la Horo | " | 5,28 |
| -Forkaptita | " | 26,40 |
| -Historio de SAT | " | 9,24 |
| -Infanoj de Malriĉuloj | " | 13,86 |
| -Internacie Kuiri | " | 37,02 |
| -Kancero kaj Ekologio | " | 6,60 |
| - La Kapo de l' Gorgono | " | 25,08 |
| -La Komencanto (BRAILLE) | " | 2,50 |
| -Hunda Bazaro (BRAILLE) | " | 6,50 |
| -Kvardek Paŝetoj | " | 4,95 |
| -Kvarteto de Mendelssohn (BRAILLE) | " | 13,00 |
| -Kial Mi Estas Ateisto | " | 12,37 |
| -Kvin Noveloj | " | 8,25 |



-Ne Tiel Sed Ĉi Tiel (BRAILLE)......... " 3,00
-Paroligiloj......................... " 3,30
-Petro............................... " 4,29
-Por Tutmonda Civitismo.............. " 9,90
-Revolucia Registaro. Anarkista Agado en
la Revolucio. La Pariza Komunumo....... " 2,64
-La Rezolucioj de la Kongreso de Saint-
Imier.................................. " 1,32
-Ribela Saĝo. (BRAILLE)................ " 7,00
-Sennaciece Tra Nia Mondo.............. " 23,10
-Sorto de Homo. (BRAILLE).............. " 8,00
-Solandro.............................. " 3,00
-Trojaninoj kaj Ifigenia en Taŭrido.... " 19,14
-Turoj de l' Popoloj................... " 9,90
-La Verda Koro (BRAILLE)............... " 30,00
-Versaĵoj. Libro Unua (1912)........... " 7,92
-Etimologia Vortaro A-D................ " 29,04
-Paroliga Kurso..................... Cr$ 500,00

JOIAS RARAS:

CHAMAMOS A ATENÇAO PARA O FATO QUE OS LIVROS RELACIONADOS DE "AMKONKURANTOJ" ATE "RUSAJ RAKONTOJ" REFEREM-SE A OBRAS EDITADAS AINDA EM 1923 - RELIQUIAS PORTANTO - QUE MERECEM SER LIDAS E GUARDADAS COM CARINHO. "IMPERDÍVEIS"!

Aqui estão mais 2 livros que todo esperantista deveria possuir, como fonte segura de informações:

- La Fenomeno Esperanto..................gld 19,80
- ESPERANTO. Lingvo, Literaturo, movado. " 19,60

PROMOÇAO

O LIBROSERVO anuncia que, até 30/11/90, o livro "Kion Travivis Aŭstra Familio en Brazila Praarbaro, Kie ĝi Laboris Kiel Koloniisto" estará sendo vendido ao preço de 25,00 florins, não sendo cobradas despesas de correio.

O preço normal do livro é de 29,70 florins, mais o porte.

=====================================================================

****** LASTE APERIS... SUR NIA BRETARO II ******

=====================================================================

******                                                                  ******

| | |
|---|---|
| -Anatomia Nomenklaturo................... | gld 85,00 |
| -Abunde kaj Redunde...................... | " 3,30 |
| -Fabeloj................................. | " 6,60 |
| -Skandalo pro Jozefo..................... | " 7,70 |
| -Pri la Varmo............................ | " 8,25 |
| -Terminologia Kurso...................... | " 13,20 |
| -Esperanto 1 (Prachar)................... | " 10,00 |
| -Esperanto 2 (Prachar)................... | " 12,00 |
| -Esperanto-Medicina Terminaro............ | " 13,20 |
| -Sur la Vojo de la Analiza Skolo......... | " 43,89 |
| -Kompleta Lernolibro de Regual Esp. I.... | " 24,60 |
| -Kompleta Lernolibro de Regual Esp. II... | " 24,60 |
| -Pri la Absoluta Malneceso Mortigi la Akademion.............................. | " 10,89 |
| -La Esenco de la Analiza Skolo........... | " 5,50 |
| -Pledo Por Unueca Lingvo................. | " 55,00 |
| -La Ora Libro de "Maĵorio"............... | " 7,50 |
| -La Kanzonoj de Bilitino................. | " 13,20 |
| -La Fabelo (de Fongojto/ Goethe)......... | " 9,90 |
| -Evangelio Laŭ Petro kaj La Morto de Jesuo kaj Kio Poste?.................. | " 1,98 |
| -Apologio (197 P.K.) - Tertuliano........ | " 10,98 |
| -Sinkonservo; Pri Kristanismo kaj Nukleaj Armiloj........................ | " 6,93 |
| -Unitariismo; Skizo pri la Kredoj, Historio kaj Organizo de la Religiuloj Nomitaj Unitarianoj.................... | " 1,98 |
| -Dio, Kristanismo kaj Aliaj Religioj..... | " 4,62 |
| -Evangelio laŭ Maria Magdalena........... | " 1,98 |
| -Jam Temp' Estâ! "La Kairos-Dokumento" de Sudafrikaj Kristanoj................... | " 4,62 |
| -Kantu al la Eternulo.................... | " 6,60 |
| -La Virino en la Judismo................. | " 6,60 |
| -SeKELIpoetas............................ | " 6,60 |
| -Kantiko de l' Kreitaĵoj................. | " 1,65 |
| -Ek Jardeko de Eklezio en Solidareco kun Virinoj.............................. | " 2,31 |
| -Defendo de la Libro Pri la Triunuo...... | " 3,30 |

| | | |
|---|---|---|
| -La Remonstranta Frataro............... | " | 3,30 |
| -Vi Kion Legus Tie ĉi?................. | " | 3,63 |
| -Trifolio.............................. | " | 6,60 |
| -La Fragmentoj de Heraklito............ | " | 5,28 |
| -Dankon, Amiko! ....................... | " | 13,84 |
| -Zamenhofa Ekzemplaro ................. | " | 141,90 |
| -Nud-pieda Ĝen......................... | " | 33,00 |
| -Esperanto-Ĉina Vortaro................ | " | 66,00 |
| -Paŭlo ................................ | " | 4,00 |
| -Legu Progresanto ..................... | " | 4,00 |
| -Eklegu Komencanto .................... | " | 4,00 |
| -Mateo kaj Hedviga .................... | " | 4,00 |
| -Fajron Sentas min Interne............. | " | |
| -Maria kaj la Grupo.................... | " | |
| -Enlumas min Senlimo................... | " | |
| -La Dekdu Notoj de Satano.............. | " | |

==================================================

NOTA: O asterisco (*) indica os títulos que, já faturados, ainda não chegaram ao Libroservo. Os 04 (quatro) últimos títulos estão sem preço, pois as faturas ainda não chegaram.

## NI KONDOLENCAS

Kun bedaŭro ni konstatas la forpason de 2 eminentaj esperantistoj en la daŭro de tiu ĉi jaro:

En aprilo ni perdis la kunlaboron de samideano DEODATO DE MELLO FRANÇA, kiu dum plurjara periodo regule publikigis artikolojn en plej diversaj gazetoj.

Pasintan junion forlasis nin FRANCISCO DE SOUZA ALMADA, kiu multon faris por Esperanto en nia lando. Samideano ALMADA estis unu el la fondintoj kaj siatempe prezidanto de BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO, kiu antaŭ nelonge kunfandiĝis al BEL.

Al la respektivaj familioj, nome de BEL-Estraro kaj de la brazila esperantistaro, ni prezentas plej elkorajn kaj sincerajn kondolencojn.



## CU NI MALPRAVAS ?

En sia aktivado, Brazila Esperanto-Ligo disponigas al la ĝenerala publiko kaj aparte al siaj membroj diversajn servojn, kiuj neniel celas esti profitigaj al la LIGO. Tio signifas ke tiuj servoj estas tute senpagaj, precipe kiam temas pri mendoj aŭ abonoj faritaj de membroj de BEL. La krompago de 10% ĝenerale postulata de nemembroj, kelkfoje estas sufiĉa por pagi eĉ ne la poŝtajn elspezojn. La administrajn kaj bankajn kostoj ? Des malpli !

Kiu iam spertis pagi aliĝkotizon rekte al UEA, abonon de gazeto al eldonisto, aĉeti libron aŭ ajnan varon eksterlande, scias kiom da tempo, pacienco kaj mono-elspezo tio signifas. Mi dubas ĉu BEL ne devus postuli ĝustan pagon pro tiuj servoj. Eble tiu estas la ĝusta vojo cele al plibonigo de la servoj!

Kelkfoje ni ricevas plend-leterojn kiuj rilatas al abono de iu gazeto, kiu post 2/3 monatoj alvenis nenio al la abonanto. Krom malĝojiga, tio estas tre embarasa, ni konfesu. Unue, ĉar oni ŝatus havi pli bonan servon; due, ĉar ne ĉiam dependas ekskluzive de BEL Administracio, sed ankaŭ de la eldonisto kaj aliaj faktoroj.

Domaĝe, eĉ se ni havus sufiĉe da laborfortoj kaj tuj atentas vian mendon, tio ne signifas esti kreitaj la bazaj kondiĉoj por plusendi la peton al la koncerna instanco. Tiu-okaze oni devas kontroli ĉu estas aliaj mendoj por forsendi kune kaj tielmaniere malpliigi la bank-kostojn. Ĉu vi scias ke oni devas pagi al banko la minimumon de US$ 15,00 (usonaj dolaroj) por kiu ajn monsendo ĝis US $ 1000,00? Jen la kialo kelkfoje atendi la amasiĝon de diversaj mendoj/pagoj, kiuj egalvaloros al proksimume US $ 1000 kaj ne kaŭzi grandan malprofiton al BEL.

Sed en aliaj okazoj estas la problemo de la disponebleĉo de amiko CARLOS MARIA, kiu volontule respondeĉas pri la ABONSERVO. Li, kiel la

ceteraj "BEL-oficistoj", ne ricevas salajron kaj tutmale devas "pagi" por labori.

La "malmulta" tempo, kiun ĉiu el ni dediĉas al BEL-aferoj, estas tempo forrabita de la kunvivado en la sino de ĉies familio; de la deĵor-periodo en la laborejo je la risko esti maldungita kaj perdi la financan bazon por aktivi en la movado; aŭ estas ripoz-horoj pri kiuj oni rezignis porĉiam. Tial ni volas ĉi-okaze, krom la kunlaboro, peti vian indulgon kaj komprenemon al tiu grupo kiu faras sian eblon plej efike SERVI VIN. Do, ne koleru se ne ĉiam oni sukcesos akurate liveri tujan respondon al viaj demandoj! Ĉu vi estas preta al kunlaboro, proponu vin por kiu ajn servo. Ni ĉiuj sendube, estos tre feliĉaj kaj sentos sin malpli pezaj!...


## AGRADECIMENTOS

Agradecemos de público à VARIG e à REAL Encomendas e Cargas Ltda que fizeram o transporte do material do Libroservo para o Congresso em Salvador e a Bienal em São Paulo, respectivente, sem ônus para a LIGA.

Outros agradedimentos reservamos para o próximo número deste boletim!




Real Encomendas e Cargas Ltda


CIDADE COMENDADOR ROMÃO
EMPREENDIMENTOS IMOBILIÁRIOS LTDA.
José Romão Filho
•LOTES INDUSTRIAIS • LOTES COMERCIAIS
•LOTES RESIDENCIAIS
VENHA MORAR BEM, FUJA DO ALUGUEL
MAPA DA CIDADE
COMENDADOR ROMÃO
SETOR-A
SETOR-B
SETOR-C
SETOR-D
SETOR-E
SETOR-F
SETOR-G
Lote da Liga
351 · 4393
TELEX: 061-TX.3296 - IDET
C.09 - LT.03 - LJ.01 (FUNDOS) - TAGUATINGA-DF



O mais novo lançamento
de FLÁVIO FONSECA !
É o cassete AERLUMO ,
genial versão em Esperanto
do LP "Luz do Ar",
recente sucesso de Flávio.
Contém dez músicas de
alto nível, com participação de
Antonio Adolfo, Nando Carneiro
e muito mais!
E ainda um encarte com comentários
do autor e todas as letras para você acompanhar!
PEÇA JÁ O SEU!

Edição e distribuição exclusiva: BEL.
Preço: Cr$ 1.300,00. Desconto para revendedores.

## ASSOCIAÇÃO DE BRASÍLIA PATROCINA PROGRAMA DE RÁDIO

Semanalmente um programa de música instrumental, com quatro anúncios de 30 segs. sobre o Esperanto e cem chamadas por mês, nas quais o locutor informa: "Um oferecimento, Associação Brasiliense de Esperanto".

É assim que a ABE está patrocinando "Sexta Instrumental", da Rádio Nacional FM, uma das mais ouvidas de Brasília, mostrando que colocar o Esperanto na mídia dá retorno garantido: os próprios cursos ministrados na Associação geram o capital que é investido em publicidade e professores.

Ao contrário do que parece, este é um investimento fácil. A ABE se coloca à disposição para orientar outros grupos que queiram fazer o mesmo em suas cidades.

**Remetente:** **LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**
**Caixa Postal 11-1105**
**CEP 70084 - Brasília - DF**

MI amas ESPERANTO-n

IMPRESSO